
# ESPERANTSKÁ LITERATURA





20

B

**BACEV, Marin.** Bulgaro. Naskiĝis en 1927. Mortis la 28-an de septembro 1996 en Sofio. Li pasigis sian movadan vivon en la servo de Esperanto-instruado, i.a. kiel vic-sekretario (1985-88) kaj ĉiam aktiva membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, respondeculo de Bulgara Esperanto-Asocio pri instrumetodiko, ekzamenanto en UEA/ILEI-ekzamenoj kaj delegito pri instruado. Li kunverkis oficialan metodikan gvidilon bulgarlingvan (1983), kuntradukis libron pri la komponisto Dimitar Terziev titolita "Per flugiloj de la kanto" (1995), kaj redaktis la antologion "Kubaj popolaj fabeloj" (1996). Li instruadis diverslande: en 1990 dum ses monatoj li instru-preparis kubajn esperantistojn antaŭ la UK en Havano, kaj laste li gvidis kursojn en aprilo-junio 1996 en Litovio. Li verkis poeziaĵojn, kiuj ankoraŭ ne aperis libroforme.


**BAENA Nuno Alvares Rodrigues.** Pseŭdonime Forgesito. Brazilano. Naskiĝis la 25-an de julio 1865 en ŝtato Pará. Li diplomiĝis pri medicino en universitato de Rio de Janeiro kaj vivtenis sin kiel kuracisto (kirurgo) de la brazila Mararmeo. Kunfondinto kaj unua vicprezidanto de Brazila klubo "Esperanto", fondita en la jaro 1906 en la sidejo de la ĵurnalo "O Paiz" (en Rio de Janeiro). En 1918 li fondis la duan Esperanto-grupon en la lando, sub la nomo "Studejo" (en Florianópolis, ĉefurbo de ŝtato Santa Catarina). Poeto kaj rakontisto. Verkoj: "Ama Stelaro" (originalaĵoj kaj tradukaĵoj: 2 teatraĵoj, 5 rakontoj kaj 12 poeziaĵoj, 1922). En Belém li kreis kaj estis la unua prezidanto de du Esperanto-grupoj: "Norda Matena Stelo" (1909) kaj "Energio" (1921). Li forpasis la 11-an de novembro 1922.

BAGHY
Julio

**BAGHY, Julio (Gyula).** Hungaro. Verkisto kaj Esperanto-instruisto, antaŭe aktoro. Naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en Szeged. Lia patro estis drama aktoro kaj la patrino teatra sufloristino. Post siaj lernejaj studoj ankaŭ li fariĝis aktoro kaj reĝisoro de diversaj teatroj. La unua mondmilito rompis lian karieron kaj ses jarojn li devis pasigi for de sia patrujo en rusa militkaptiteco. Ankoraŭ dum sia junaĝo multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. En 1911 li konatiĝis kun Esperanto kaj ĝia "interna ideo" tuj forlogis lin. Lia ampleksa Esperanto-agado komenciĝis jam en la sesjara siberia militkaptiteco, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj. Alveninte al Hungario post la milito, li fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Li gvidis multajn diversgradajn kursojn, prenis gvidadon de Esperanto-Rondo Amika, aranĝo de literaturaj vesperoj ktp. Dum pluraj Unviersalaj Kongresoj li estis aktoro kaj reĝisoro de la kongresaj teatraĵoj. Por la reorganizo de la internacia Esperanto-movado ellaboris detalan proponon titolitan "Publika letero" (1931). Agitis multe por plialtigi la spiritan nivelon de la esperantistaro, tion celis ankaŭ la iniciato, laŭ kiu la naskiĝtago de Zamenhof fariĝis la tago de la Esperanta libro. Kiel Cseh-metoda instruisto gvidis multajn kursojn diverslande (ekz. en Estonio, Latvio, Nederlando, Francio ktp). Kunlaboris al multaj Esperantaj gazetoj kaj estis unu el la ĉefredaktoroj de "Literatura mondo" (ĝis 1933). Liajn verkojn karakterizas la tendenco, kiun esprimas lia devizo: "Amo kreas pacon, paco konservas homecon, homeco estas plej alta idealismo." Liaj unuaj poemoj venis el rusa militkaptiteco; ili kaŭzis surprizon kaj ĝojon. Zamenhof kaj la antaŭmilitaj Esperanto-poetoj estis baritaj de eblecoj. Zamenhof mem povis forgesigi la neperfektecon de la poezia lingvo, almenaŭ plejparte

# Lexikon esperantských spisovatelů z roku 2006 uvádí 890 autorů píšících v esperantu

# Příklady knih psaných v esperantu




## Vidíme různé žánry, humor, historické romány, romány pro mládež, společenská temata

# Překlady ze světové literatury




## Ze světové literatury se překládá literatura dobrodružná, pro mládež, společenská klasika i romány orientálních literatur

# Oborná a populární literatura




# Objevují se cestopisy, historie, přírodověda, jazykověda, filozofie, jazykové antologie, náboženství

# Čeští autoři v esperantu




**V horní řadě vidíte českou klasiku:**
**Čapek, Hašek, Havlíček, Seifert**
**Ve spodní řadě české autory píšící esperantsky:**
**Vinař, Bubeníček, Píč, Urbanová**